Universala Esperanto-Asocio

**ARABIO:**

**lernilo kaj evento**

**Estrara Subteamo: MOVADO**

*Estrara Komuniko EKO 2017-23 sendita el Budapeŝto, la 24an de aŭgusto.*

*Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de UEA

# Nova lernilo por arablingvanoj

Jus aperis la lernolibro de Stano Marĉek en la araba. Tio kontribuos signife al la laboroj de la Komisiono MONA disvastigi Esperanton tra tiu postrestanta regiono. Specife tio utilos por Maroko, kie okazos la sekva Mezorienta Kunveno (vidu sube) kaj Jordanio, kie oni en 2019 volas okazigi komunan dupartan eventon, parte en Israelo kaj parte en Jordanilo.

La prezo por mendo de unu ekzemplero estas 7,50 € (ekde 3 ekz. triona rabato), plus sendokostoj. Oni povas mendi ĝin rekte ĉe <stano.marcek@gmail.com>. Aperas ankaŭ disko, sur kiu estas la lernolibro en pdf + modela elparolo en mp3. Oni do povas vidi la tekstojn kaj bildojn, aŭdi la modelan elparolon kaj imiti ĝin. Tiu kostas 15 €, triona rabato ekde 3 ekz.

La lernolibro jam aperis en 40 lingvoj: la angla, franca, itala, rusa, ĉina, japana, korea, portugala, pola, slovaka, Esperanta, greka, nederlanda, irlanda, rumana, germana, dana, litova, serba, vjetnama, luksemburga, hungara, kroata, finna, ĉeĥa, hispana, ukraina, sveda, tajvana, armena, taja, norvega, islanda, indonezia, turka, hinda, bulgara, latina, araba kaj latva.

## Jam dekunufoje en MONA, reveno al la Magrebo

Tunizio, Turkio, Kartvelio … kaj nun Maroko. Jen la fluo de la Mezorientaj Kunvenoj tra la lastaj jaroj. Tiu aranĝo ne altiras grandan publikon, sed havas sian entuziasman klientaron kaj ĉiujarajn revenantojn; la partoprenantoj ĉiam inkluzivas lokulojn aŭ najbarlandanojn.
Lokoj kaj datoj de la 11a MK: Marakeŝo, Maroko, 30-a de marto 2018 ĝis la 6-a de aprilo inkluzive de la postkunvenaj ekskursoj.



La aliĝkotizo estas 20 eŭroj pagendaj al la konto 'arabio' ĉe UEA kun la indiko 'Mezorienta Kunveno'.

Pag-informoj por UEA:
www.uea.org/alighoj/pag_manieroj.html

Informojn ĉiam ĝisdatigitajn ĉe:
http://uea.org/vikio/La_dekunua_Mezorienta_Kunveno_en_Marakesho,_Maroko

Oni loĝos en Villa Janna: www.villajanna.com. Adreso: Douar El Mghazli - C.R. Al Ouidane. La kosto estas € 30 por nokto por persono en duobla ĉambro kaj €55 en sola ĉambro. La kosto de ĉiu unuopa manĝo estos €12 kaj €7 por matenmanĝo.

Jam alvenis 16 aliĝoj (la kutimuloj!) el Belgio, Britio, Danlando, Germanio, Greklando, Latvio, Maroko, Nederlando, Rusio kaj Svislando. Rektaj flugoj ekzistas el trideko da flughavenoj – eĉ regionaj – en Aŭstrio, Britio, Belgio, Danlando, Francio, Germanio, Italio, Kataro, Luksemburgo, Nederlando, Pollando, Svislando, Svedio, Turkio, Tio inkluzivas multajn flugojn de nealtkostaj kompanioj: *easyJet, Ryanair* kaj *Transavia*.
Fonto: https://en.wikipedia.org/wiki/Marrakesh_Menara_Airport (kun sugesto al la organizantoj okupiĝi pri ligita resumpaĝo en la E-vikipedio).

## La aŭtuna propono de kulturcentro Greziljono

11-15 septembro: Migrado en Esperanto kun Olivier Buisson, vidu http://gresillon.org/a1

25a de okt. ĝis 1a de nov.: AŬTUNE la ferioj, kursoj, aktivaĵoj por infanoj, halovena festo, koruso Interkant', vidu http://gresillon.org/a

## AVE malimponita pri la kongresa rezolucio

Nia faka asocio pri ekologio (AVE) reagis kritike pri la rezolucio de la 102a Universala Kongreso en Seulo. Jen fragmento el tiu rezolucio:

> **Konstatante**
> la gravecon de daŭripova turismo por la tutmonda Esperanto-lingvokomunumo, kies anoj ofte vojaĝas por renkonti unu la alian kaj por ekkoni la riĉecon de aliaj kulturoj.
> …

AVE cirkuligis vaste serion de komunikoj kaj mesaĝoj. Jen fragmentoj el la unua el tiuj komunikoj:

> “La ĉefaj rekoniloj/konceptoj de daŭripovo/daŭripova turismo estas reduktado, kompensado kaj adaptado. Ili tute ne estas adresataj en la 7 [rezoluciaj] alineoj -- verŝajne pro manko de unuanimeco, ĉu? La invito al "aktivuloj pri daŭripova turismo konsciiĝi pri la grandaj avantaĝoj de komuna neŭtrala lingvo por la kultivado de respondecaj kaj reciprokaj rilatoj inter turistoj kaj gastigantoj" faras sencon nur, se oni povas enkadrigi ĉi tiun inviton per ĉi tiuj ĉefaj trajtoj. Tio rilatas al ekz. la t.n. plezurturismo, kiu certe ja grave rolas ankaŭ en la movada turismumado.






> […]
>
> “La homfarita klimatoŝanĝiĝo spite al la klimatokonvencio de Parizo 2015 akriĝas, kaj la turismo en ĉiuj siaj formoj grave kontribuadas al tiu katastrofigo. Postulata estas karbondioksida neŭtraleco kaj tio signifas laŭ aktualaj esploroj daŭripove akcepteblan kvanton de 2 - 3 tunoj da karbondioksido ĉiujare/ĉiuhome. La naturo finfine ne demandas, kiu sociale kaj kulture-lingve altedukita *homo turisticus* ĝin detruas.



Ni aldonas la tekston de la rezolucio alkroĉe al ĉi tiu EKO.

Vortoj: 650

===============

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, volapukistoj, klingonuloj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.